

Usona Esperantisto № 2020:6 (nov-dec)

Announcements

Invito partopreni en la Belartaj Konkursoj; Looking for McLinen Dictionary; Arĥivo de la Virtuala Kongreso; Korespondpeto el Mongolujo; Nova numero de *Esperantologio*; *Sen timo* de Kajto; Pri UK-2021 en Belfasto; Interkultura Novelo-Konkurso (INK)

The Landa Kongreso in 2021

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Using hindsight and noticing the success of our virtual event of 2020 we went ahead with plans for a virtual event in 2021. We are confident that our experience from last year will make this *Landa Kongreso* the best ever.

Leterkesto

Ekzistas "lando" kie Esperanto estas oficiala.

Dek anglalingvaj bovinoj, kvaroble

traduku! • HOSS FIROOZANIA

(Respondoj al la defio el *Dek bovinoj*; nova defio el *Neologisme* de Lorjak.)

La historio de psikedelismo en Usono

kulturo • STEVE EICHBLATT

(Tria parto el tri.) Fine de la 1960-aj jaroj, Huxley estis mortinta, Leary kaj Kesey estis silentigitaj, kaj medicina esploro pri psikedelaj substancoj estis malpermesita. Sed la jam plantita semo kreskadis, eĉ subtere.

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj de Rafa NOGUERAS kaj Rico GIACOMETTO.

Strange, sed vere

Strangaj novaĵoj el ĉirkaŭ la mondo, en facila Esperanto.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • TIMOTHY BORONCZYK

La dekdua en serio de Timothy BORONCZYK.



Announcements

Partoprenu en la Belartaj Konkursoj de UEA

UEA instigas beletremulojn konkursi per altkvalitaj verkoj en la nova okazigo de tiu kultura evento, unu el la jam tradiciaj kaj plej ŝatataj en Esperantujo. Plie, oni anoncas la enkondukon de nova branĉo, nomata “Kantoteksto”, kun la celo provizi E-kantistojn per bonaj kantotekstoj por iliaj repertuaroj. La unusola premio en tiu branĉo konsistas el muzikigo de la premiita teksto kaj prezento de la rezulta kanto fare de kantisto aŭ kantogrupa.



La rezultojn oni anoncos, ĉu ĉeeste, kadre de la 106-a Universala Kongreso de Esperanto en Belfasto (Nord-Irlando), se oni ĝin fine povos okazigi, ĉu iam, inter Julio kaj Septembro, kadre de virtuala BK-Festo samspeca kiel la ĉi-jara. Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo “Infanlibro de la Jaro”. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo.

La branĉoj estas: Poezio, Prozo, Prozo/Mikronovelo, Teatraĵo, Teatraĵo/Monologo, Eseo, Infanlibro de la Jaro, Kantoteksto.

La absoluta limdato por ricevo de Konkursaĵoj estas la 31-a de Marto 2021.

Por pli da informo, bv. vidi **la plenan regularon ĉe UEA** <https://uea.org/teko/regularoj/belartaj_konkursoj>.

Looking for McLinen Dictionary

I am searching for a copy of the *Pocket Esperanto Dictionary* published by UEA. If you have a copy that you no longer want to keep, please contact me at eus@esperanto-usa.org. I will be happy to pay the original price (15 euros at UEA) plus shipping cost.

Dankon!

— Bill HARRIS, Director of the Central Office eusa@esperanto-usa.org

Reviviga projekto de la Virtuala Kongreso

Pli ol du mil membroj de UEA partoprenis aŭ poste spektis la programriĉan Virtualan Kongreson (VK) sen lasi sian hejmon. Por konservi tiun unikan sperton, UEA lanĉis la projekton Viva Virtuala Kongreso (VVK) en la **YouTube-kanalo UEAviva** <<https://youtube.com/user/UEAviva>>. Jam de du monatoj, iom post iom oni enretigas la programerojn okazintajn dum VK-semajno (1-8 de Aŭgusto) ĉiutage.


Ekzistas **listo kaj tabelo** <<http://mondafest.net/programo>> de ĉiuj programeroj. La diversaj programeroj estas kolorigitaj laŭ sia speco, ekzemple Kongresa temo, sciencaj programeroj, distraj, kulturaj, ekskursoj, prelegoj, ktp.

Fine de la projekto estos videblaj ĉiuj spekaĵoj de la kerna VK-programo. Entute estas 99 programeroj, el kiuj pli ol 70 estas jam alŝutitaj.

Korespondi deziras

Mia nomo estas Batzaya Tsetseg-Ulzii, kaj mi volas interŝanĝi paperajn leterojn per simpla, tradicia poŝto kun usonaj geamikoj.

Mi ankaŭ volas ricevi Esperanto-lernolibrojn por anglalingvaj parolantoj kaj ĝisdatan anglan-Esperantan-anglan vortaron (ekz. tiun de Peter Benson). Mi uzos la Esperanto-lernolibrojn kaj




vortarojn por miaj gelernantoj, kiuj scipovas anglan lingvon. Rekompence mi sendos perpoŝte ion ajn, kion vi volas ricevi.

Ts.Batzaya, P.O. Box 57, Ulaanbaatar 210646, Mongolia/Mongolujo
ts.batzaya@gmail.com

Esperantologio inaŭguras novan serion

Esperantologio / Esperanto Studies estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilataj al Esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto – kaj ankaŭ recenzojn pri libroj. Ĝi publikigas materialon en Esperanto aŭ en angla lingvo, sed estas principe malfermita al materialo ankaŭ en aliaj lingvoj.



Numero 9 (1) ĵus aperis, kaj jam estas mendebla ĉe la eldonejo Mondial kaj **ĉe la Libroservo de UEA**

<<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9824>>.

Redaktita de Humphrey TONKIN kaj Orlando RAOLA, ĝi enhavas ĉefe referaĵojn prezentitajn en antaŭaj Esperantologiaj Konferencoj. La plena teksto de tiu ĉi numero estos baldaŭ disponebla ankaŭ en **la retejo de ESF** <<https://www.esperantic.org/en/esperantic-studies/>>.

Esperantologio / Esperanto Studies celas iĝi loko kie esploristoj havu okazon prezenti siajn verkojn kaj ricevi konsilojn kaj sugestojn de nia rondo, en amikeca etoso, dum ni ankaŭ plimultigas fakajn materialojn kaj sciojn pri Esperantologio. Manuskriptojn kaj demandojn oni sendu al tonkin@hartford.edu aŭ guilhermefians@gmail.com.

Sen timo de Kajto

Ankie & Nanne de la nederlanda muzikgrupo Kajto sendis la jenan anoncon.

Dum la pasinta periodo ni multe laboris por fari kant-

videon. **Sen Timo**

<<https://youtu.be/oleyMmMYyOM>>

estus nia kontribuo al la *Festivalo por la Paco* de UNESKO. La festivalo ne okazis.



Tamen ni faris la kant-videon kaj publikigis ĝin en YouTube. Ni esperas ke ĝi plaĉas al vi. Multaj gastmuzikistoj helpis nin.

Aŭskultu, rigardu, pripensu, ĝoju ...

UK 2021 en Belfasto

La 106-a Universala Kongreso (UK), kiu okazos en Belfasto, Nord-Irlando, de la 17-a ĝis la 24-a de Julio 2021, havos kiel temon *Paco kaj konfido: universalaj valoroj*. Surbaze de la UN-temo por 2021, deklarita la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, la kongres-temo ligiĝas al la specifaj realoj de la kongreslando, tiel ke la Esperanto-komunumo povos pridiskuti la universalecon de tiuj valoroj kaj la kontribuon de Esperanto al reciproka interkompreno, kio mem troviĝas ĉe la bazo de paco kaj ajna konfido.



La temo ankaŭ respegulas la UK-emblemon, kiu prezentas signifohavan skulptaĵon ekde 2007 starantan en la malgranda *Thanksgiving Square* de Belfasto. Per ĝi la skulptisto Andy SCOTT esprimis koncepton de Myrtle SMYTH, kiu siavice mem inspiriĝis de alia multe pli granda *Thanksgiving Square* en Dalaso (Teksaso, Usono). Post la jaroj de konflikto en Nord-Irlando, S-ino Smyth kredis, ke simile devus esti spaco en Belfasto, kie oni povus festi dankadon, pacon kaj esperon pri la estonteco, de kio do venis la placo sur kiu staras la skulptaĵo de Scott. Belfastanoj donas al tiu virinoforma skulptaĵo multajn nomojn: ŝi nomiĝas Virino de Dankado, Simbolo de Espero, Belulino sur la Globo, Virino de la rivero Lagano ktp. La virino levas la ringon de dankado, staranta apud la rivero Lagano, ne malproksime de la centro de la urbo. La surlokaj esperantistoj diras, ke la simbolo estas bela, moderna, vigla, impona, kiu de sia koncepto ligiĝas al la afero de espero.

Smyth mem laboris kiel pioniro de paco en Irlando. Ŝi multegon atingis, vivante por konstati grandparte la venkon de la propraj idealoj, kun firma kredo, ke per persisto la amo nepre venkas ĉian perfortemon. La universitato Principia, en kiu laboras UEA-Prezidanto Duncan CHARTERS, speciale invitis ŝin tiam, kiam ŝi faris prelegvojaĝon en Usono. Universitatoj aŭskultis ŝin ravitaj, ĉar dum pli ol du horoj ŝi regalis ĉiujn per preskaŭ nekredablaj rakontoj pri venkoj kontraŭ malamo, per kuraĝa paciga laboro en la plej danĝeraj cirkonstancoj. Pri tio honore prelegis la prezidanto de UEA ferme de la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK). **La prelego re-spekteblas en YouTube** <https://youtu.be/oJ_k0kzJ2sg>, kaj per ĝi eblas konatiĝi kun la verko de Smith kaj la tuta historio pri ŝia idearo. “Myrtle Smyth estas la plej inspira persono, kiun mi iam aŭskultis aŭ renkontis kaj tiu historio por mi estas parto de la kialo kongresi en Belfasto”, diras Charters.

Aliĝu al la 106-a UK <<https://uea.org/kongresoj>> por ne maltrafi la plej favoran aliĝperiodon. Jam 107 homoj el 31 landoj aliĝis. Same kiel por la 105-a UK, la aliĝilo proponas subtenon al karbonkompensaj agadoj per donaco al la nova fondaĵo Klimato CO2. Por kuraĝigi kaj doni sekurecon al esperantistoj, konsiderante la necertecon kaŭzitan de la pandemio de KOVIM-19, la Estraro de UEA aprobis, ke ĉiuj aliĝintoj rajtos rricevi sian kongreskotizon minus 15 EUR (pro administraj kostoj), se la UK ne povos okazi ĉeeste. Ĉiel ajn UEA planas okazigi la belfastan

kongreson kiel hibridan aferon, nome kun Virtuala Kongreso lige kun la ĉeesta. Pri tio baldaŭ aperos pliaj informoj.

Interkultura Novelo-Konkurso

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) estis lanĉita de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) ĉe MondaFest’ 2020 sub la aŭspicio de UEA. La prezidanto de la konkurso estas François (Francisko) LORRAIN el Kebekio, kaj Nicola RUGGIERO el Italujo estas sekretario. “Ni tre antaŭĝojas pri la alvenontaj kontribuadoj. Certe tiu ĉi konkurso helpos plu kulturi nian literaturon kaj nian homaranismon en tiu ĉi epoko”, deklaras ili.



INK okazas ĉirkaŭ la temo *KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin* kaj jam ricevis novelojn el Eŭropo kaj Ameriko. Verkemuloj el la tuta mondo bonvenas sendi siajn tekstojn ĝis la 20-a de Junio 2021. Interkultura juĝantaro elektos la gajnintajn novelojn, kiuj ricevos premiojn de 500, 300 kaj 200 eŭroj laŭ la 1-a, 2-a kaj 3-a loko, respektive. Jen **kompleta regularo**

<<https://www.akademio-literatura.org/ink/regularo>>. La konkurso-rikolto estos publikigita kiel bitlibro.

La vivo de Peĉjo

Serĉoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de “Awesome Satyr”. (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

The *Landa Kongreso* in 2021

de la prezidanto • Filipino DORCAS

Save the date: **June 12–19, 2021** are the dates for our next virtual *Landa Kongreso* for Esperanto-USA. When your Board of Directors made plans for the event we had no crystal ball. We could not accurately determine whether or not to plan an in-person gathering. Using hindsight and noticing the success of our virtual event of 2020 we went ahead with plans for a virtual event in 2021. We are confident that our experience from last year and the growing interest in the Esperanto community will ensure that this *Landa Kongreso* will be the best ever.

Participate online

Join with us online. As a member of Esperanto-USA you will receive invitations to register when the registration becomes available. Those who are registered will receive links to the events.

Participate live in your region

By the time the LK arrives, it might be possible to meet in person. If that happens we hope that local clubs or even regions will plan some in-person meetings and join with the LK from your meeting! We are planning sessions during the weekends that bookend the LK for live participation from in-person events. Get with your club and stay in contact with your regional coordinator to help enable this to happen. We want to include as many people as possible in our online event while at the same time encourage in-person participation in our LK wherever that is possible.

Get the latest news

What is the state of Esperanto-USA? What have we accomplished? How are we progressing? What are our plans? What does the Esperanto community in the USA look like? What opportunities are there for you? How can you participate? Why should you participate?

What do you want to know? You will have the opportunity to ask!

Find out this and more by attending the LK!

See “how the sausage is made”

You can see how the planning is done, what our budget looks like, and what the journey looks like for your Esperanto USA. You can “see the sausage being made.” Plan to be there for one of the business meetings. And for those vegetarians and vegans, please have no fear. No animals will be harmed in the process! :)

The room where it happens

You may choose which events you wish to attend. You will not be excluded from the formal opening, business meetings, chat rooms, special interest groups, concerts, social events, or the formal closing. You can be in “The room where it happens.”

Maybe you know about the musical Hamilton and how there was an important decision made in secret. Please know that your Board of Directors has made changes to report more frequently. We are also giving members a better voice in the decisions and direction of Esperanto-USA.

What you can expect at the LK—greater variety!

We have listened to you about our national congress of 2020, and plan to include more types of events. We have more time to plan, gather interest, and invite more types of discussions. What is your hobby? What is your vision for your Esperanto community? We are likely to have something on our program that interests you in 2021!

We will continue to listen to you

Members of Esperanto-USA have varied visions and wishes for the Esperanto community. Your *Landa Kongreso* of 2021 will provide opportunities for you to voice your ideas. Pass your ideas and interests on to any board member or to your regional coordinator through your club. Catch us online via email, Discord, our Facebook page, Twitter, Reddit, Youtube, or

other social media.

How you can help

1. Register for the **Landa Kongreso 2021 de Esperanto-USA!** We will let you know when the registration becomes available.
2. Spread the news. Pass along emails, repost the posts, retweet, and promote discussion in your region and in your local club. Be sure your local club stays in contact with your regional coordinator so you can get the latest updates.

3. Provide a presentation or host a chat about your interests.

4. Check out our volunteer page on your website.

See you at the LK!! *Ni vidos vin ĉe la LK!!*



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

Mikronoveloj

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli.

Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Ĵaluzo

De la ĝardeno, tra vitra pordo de la domo, Peĉjo kaŝe gvatis ŝin – nu, ilin, ĉar Elinjo ne estis sola. “Kiu estas tiu ulo?”, scivolis Peĉjo.



Peĉjo kaj Elinjo estis kune jam de kvin jaroj. La rilato ne estis perfekta: kelkfoje ŝi eĉ forpelis lin el la domo. Tamen, ili kutime repaciĝas, kaj ŝi finfine reenlasas lin en sian vivon kaj en sian liton.

Sed nun, vidante ŝin kun aliulo, Peĉjo frenezigiĝis. “Vi estas mia!” li hurlis de ekstere. “Kial vi perfidas min!? Neniu amas vin kiel mi!”

Tamen, ene de la domo, Elinjo ignoris la laŭtan

bojadon de Peĉjo.

— *Rafa NOGUERAS* rafaeln1@gmail.com

Planedo

Kiam alimondanoj trovis planedon en ĵus malkovrita planedsistemo, ili kromnomis ĝin *La ruĝa planedo*. En sia raporto al la interstela komandejo, ili skribis: “La planedo ŝajnas kiel bruligita ŝtono, kvazaŭ vivo estintus iam tie, sed ne plu. Laŭkalkule, la planedo estas la kvara de tiu sistemo.”



Oni trovis ankaŭ iun malnovan skribaĵon: estis la sola tiaspeca trovitaĵo kaj enhavis frazerojn, ĉefe nekompreneblajn krom verso, kiu tekstis: *malam' kontraŭ unu la aliaj mortigos vin*.

Leginte la raporton, respondeculoj en la komandejo atingis la finan paĝon kaj rimarkis piednoteton: “Korektendaĵo: estis mezuraderaro. La ruinigita planedo ne estas la kvara, sed la tria ...”

— *Maurizio GIACOMETTO* mbaesperanto@btinternet.com

La historio de psikedelismo en Usono

kulturo • Steve EICHLATT

La tria artikolo en triparta serio. La unua aperis en № 2020:4 kaj la dua en № 2020:5.

Fine de la 1960-aj jaroj, Tim LEARY kaj Ken KESEY estis silentigitaj de la registaro, kaj medicina esploro pri psikedelaj substancoj estis malpermesita. Huxley estis mortinta, same kiel liaj revoj, ŝajne.



Sed la jam plantita semo kreskadis, eĉ subtere. La plej forta branĉo de la psikedelisma movado tiutempe estis *The Grateful Dead*, nova muzikgrupo el Palo Alto, Kalifornio. En 1965 Ken Kesey dungis la grupon por ludi dum la *Acid Test*-festoj. Homoj sub influo de psikedelaj substancoj estas ege sentemaj pri muziko, kaj la muzikgrupo eksciis, ke samtempa improvizado povas krei kompleksajn, ŝanĝigantajn spiritostatojn. Tiuj fruaj spertoj ŝangis la stilon de la grupo kaj kreis la “psikedelan muzikon”.

Poste, kiam Kesey estis en malliberejo kaj liaj festoj estis nuligitaj, la ĥemiisto Owsley STANLEY administris la muzikgrupon, kaj uzis monon gajnitan per vendo de LSD por aĉeti sonekipaĵon kaj gastigi la grupanojn.

The Grateful Dead iĝis kerna parto de la sanfranciska muzika kulturo. Ili loĝis kune ĉe la angulo de Haight-kaj Ashbury-stratoj en tiu nun fama kvartalo. Jam de 1968, turistbusoj trairis la kvartalon por montri hipiojn en ties “natura medio”.

Kvankam la grupo neniam furore populariĝis, ĝi havis fervorajn adorantojn, kiuj sekvis ĝin tra Usono. Ĝi iĝis impona kultura fenomeno kaj kreskadis senĉese ĝis 1995, kiam mortis ĝia gitaristo kaj kantisto Jerry GARCIA.

Koncertoj de *The Grateful Dead* donis sekuran spacon al ĉeestantaroj, kun muziko kiu kaj pelis kaj spegulis la humoron de la ĉeestantoj. La strukturo de la koncertoj estis “ĥaoso interne de ordo”. Same kiel psikedelaj vojaĝoj, ili daŭris longe, kun la plej

strangaj, mirigaj, kaj foje splenaj improvizaĵoj ĉe la pinto, kaj poste finiĝo agrabla kaj kontentiga.

Ĥemiistoj sekvis la grupon por vendi grandajn kvantojn da LSD ĉe ĝiaj koncertoj. En la lastaj el la 1980-aj jaroj, polico regule arestis ĉeestantojn. Tamen tiutempe estis jam multaj aliaj fontoj de halucinogenoj en Usono.

En la jaro 2000, la socia maltrankvilo de la 1960-aj jaroj estis jam malgrandiĝinta, kaj la fadeno de psikedelismo zorgita de Huxley, Kesey, Leary, *The Grateful Dead*, inter aliaj, daŭris. Certe, jam multaj membroj de tiama registaro estis spertintaj psikedelismon. La scenejo estis preta por nova ondo de scienca esplorado. Same kiel en la 1950-aj jaroj, ĝi komenciĝis ĉe psikiatroj.



The Grateful Dead en 1980. Fotis Chris STONE. **CC-BY-SA**

<<https://bit.ly/2My3UCi>>.

Roland GRIFFITHS estas scienca esploristo kaj meditante ĉe la universitato Johns Hopkins. Li interesiĝis pri halucinogenoj kiam li legis studon pri meditanoj kiuj atingis pli altan konscian nivelon per psikedelaj fungoj. Li sukcese petis la usonan registaron permesi al li studi la efektojn de tiuj fungoj sur homoj kiuj neniam antaŭe spertis psikedelan staton. Li kreis la esplorojn *Center for Psychedelic and Consciousness Research* ĉe Johns Hopkins. La esploristoj tie revivigis la studojn pri toksomanio (alkoholo, nikotino, ktp), inter aliaj, kiuj estis haltitaj en la 1960-aj jaroj.

En Britujo, David NUTT en 2015 kaptis cerbo-bildojn

(per magneta resonanca tomografio) de homoj sub la influo de psikedelaj fungoj. La bildoj montris, ke la fungo malaltigas la aktivecon de la “defaŭlta reto”, kiu kreas la egoon. Do la scienco ŝajne vidis tion, kion la budhanoj longe priskribis: kvietigon de la egoo por atingi uniĝon kun la universo.

Teknologiistoj en Silicia Valo komencis engluti “mikrodozojn” (ekz. 5–10 mikrogramojn) de LSD tage, aŭ plurajn fojojn semajne. Kvankam la dozoj estis tro malgrandaj por havi percepteblan efekton, uzantoj sentis sin pli kreemaj kaj bonhumoraj.

Esploristoj trovas, ke la psikedela substanco MDMA efikas kontraŭ la malsano posttraŭmata streĉa perturbo. LSD kaj fungoj efikas kontraŭ toksomanio, manĝperturboj (ekz. anoreksio), kaj depresio. La efikeco por trakti alkoholismon estas ĉirkaŭ 70%, post unu konsila kunsido kun LSD-terapio. Ĝi estas ne nur pli efika ol aliaj medikamentoj, sed paciento bezonas nur unu dozon, kaj ne daŭran kuracadon.

Por trakti depresion, la rezultoj estas kuraĝigaj. Depresio ĝenerale revenas monaton aŭ du post la traktado. Tamen la psikedela substanco ketamino rapide mildigas ĝin (en kvin minutoj, kompare kun ses semajnoj por konvenciaj traktadoj). Do ketamino povus eble antaŭmalhelpi memmortigon en depresiaj homoj.

Oni nomas la nunan periodon de medicina kaj mikrodoza uzo de psikedelaj substancoj la “tria

psikedela ondo”. Tamen la uzo de tiuj halucinogenoj datiĝas de la prahistorio per maldika, nerompita ĉeno. La medicinaj avantaĝoj estas kuraĝigaj. Sed la spiritaj ebloj povus esti eĉ pli imponaj. Laŭ Huxley:

... la oportunoj, kiujn prezentas meskalino aŭ LSD estas tro valoraj, donas al ni tro altajn privilegiojn, por esti malŝparitaj nur ĉe esplorado fare de psikiatroj. Devas esti eksperimentoj, kompreneble, sed estus malĝuste, se okazus nenio plu.

Bibliografio

1. *Storming Heaven: LSD and the American Dream* de Jay STEVENS.
2. *Heads: A Biography of Psychedelic America* de Jesse JARNOW.
3. *How to Change Your Mind: What the New Science of Psychedelics Teaches Us About Consciousness, Dying, Addiction, Depression, and Transcendence* de Michael POLLAN.



Steve EICHBLATT

sia familio.

Steve loĝas en Novjorko kun sia edzino kaj filino. Li estas fizikisto, programisto kaj financisto. Li ŝatas legi, esplori la urbon, aŭskulti muzikon de Bob DYLAN, kaj esti kun

steve.eichblatt@gmail.com

Dek anglalingvaj bovinoj, kvaroble

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn ni resumos la diversajn solvojn, kaj donos reagojn, komentojn, kaj proponojn.

(**Bonvolu noti:** la pasinta numero pretersaltis ĉi tiun rubrikon, do rezultoj de la defio el *Little Brother* aperos venontnumere.)



♪ *Ni bovinoj ŝatas muĝi ...* ♪

En N^o 2020:4 aperis tradukdefio el la furora infankanto *Dek bovinoj* de Pablo BUSTO kaj Liven DEK:

*Ni bovinoj ŝatas muĝi
Kaj manĝadi freŝan herbon.
Ni tre ŝatas la kamparon
Kaj ripozi longan tempon.*

*Ni bovinoj estas grandaj
Kaj produktas multan lakton.
Nia kapo havas kornojn
Kaj la buŝo grandan langon.*

La aranĝo estas feliĉe simpla: du strofoj, kvar versoj en ĉiu strofo, kaj kvar trokeoj en ĉiu verso (/x /x /x /x). La trokeoj donas al siaj versoj ritmon regulan kaj facile kanteblan:

/ x / x / x / x
NI bov- | IN-oj | ŜAT-as | MU-ĝi

/ x / x / x / x
KAJ man- | ĜA-di | FREŜ-an | HER-bon ...

Prezentante la tekston en pasinta numero, mi erare asertis, ke la linioj ne rimiĝas. Feliĉe, poeto Jorge CAMACHO afable respondis por klarigi, ke efektive la finaj vortoj en la paraj versoj utiligas specon de

vokalrimo; la akcentitaj silaboj havas la saman vokalon. Do la vokalrimoj estas *herbon / tempon* kaj *lakton / langon*.

Jorge skribis:

Tiu diferenco en la priskribo de la versoj (ĉu ili havas aŭ ne havas rimojn) ŝuldiĝas al kultura vidpunkto. Hispanoj tuj perceptas vokalrimojn, sed homoj el aliaj kulturoj eĉ ne aŭdas ilin.

Kiel li diris, miaj usondevenaj oreloj apenaŭ perceptas tiajn rimojn sen antaŭaverto.

Kaj jen alia dilemo por la tradukanto: ĉu konservi trajton de la originalo, kiun multaj legantoj de tiu originalo eĉ ne rimarkas? Kiel tre ofte okazas en tradukado, alfrontas nin du celoj ne nepre en akordo: Ĉu konservi la intencon de aŭtoro? Aŭ la impreson de leganto?

Feliĉe, ne necesas multe zorgi pri tiaj dilemoj en traduko de infankanto! Ĉefe gravas nur redoni ion amuzan kaj kanteblan laŭ la sama melodio. Aliaj konsideroj ne tiom gravas; eĉ la signifo de la versoj povas devii.

Elkoran dankon kaj gratulon al niaj kvar tradukintoj: CM, JB, AJ, kaj BS; ĉiuj trovis bravajn solvojn. Interese, kelkaj utiligas rimojn (aŭ preskaŭrimojn) en la paraj versoj. Ekzemple, jen la bela solvo de CM. Ĝi ne nur rimiĝas, sed ankaŭ fidele sekvas la signifon de la originalo:

*We the cows really do like to moo
And munch a bunch of sweet green grass.
We so love the bovine paddock
And relaxing while time does pass.*

*We the cows are enormous beasts
And a huge milk source for the young.
With heads adorned with pointy horns
And mouths hiding a great big tongue.*

La ritmo ŝajnas iomete neregula; provante kanti ĝin, mi kelkloke stumblas. (Bedaŭrinde, mi ne lertas pri kantado ekster duŝejoj; vere talenta kantisto eble ne same stumblas.) Ĉiuokaze, estus relative facile glatigi

la versojn al regulaj trokeoj sen fari grandajn ŝanĝojn, ekz: “WE the | COWS do | LIKE our | MOO-ing / MUNCH-ing | BUNCH-es | OF sweet | GREEN grass ...” aŭ simile.

Kontraste, la solvo de JB ne utiligas rimojn, kaj iom ŝanĝas la signifojn de la versoj. Sed ĝi lerte prezentas la same festan etoson de la originalo, kaj ritmon preskaŭ tute fidelan al ĝi:

*We are cows who like to sing songs,
about eating hay and apples!
We are cows who like to take naps,
when the field is warm and sunny!*

*Our horns are not very scary,
and our tongues are not too messy;
but our milk is very yummy,
and we all are very friendly!*

La solvo de AJ ne nur fidele redonas signifon kaj ritmon, sed ĝi prezentas interesan solvon al la ritmo-problemo. La fina vorto en ĉiu verso estas unusilaba, kun vokalo duobligita en kantado por fari trokeon:

*We are cows who like to moo-oo
and to munch on nice fresh gra-ass
we do like our lovely fi-elds
and to take a lot of na-aps*

*we are cows who are so bi-ig
and we make a lot of mi-ilk
on our heads we have got ho-orns
and our mouths have got big to-ongues*

Finfine, tre amuza kaj kaprica propono alvenis de BS, kiu nomis ĝin “ŝerca”. Al mi ĝi vekas memorojn de *Schoolhouse Rock* kaj eble Tom LEHRER:

*it's Bos taurus in Linnaean
family Ruminantia
we're the mammest of Mammalians
(granda familio vila)*

*order Artiodactyla
(that's just “cloven hooves” in Latin)
join us in the field, but maybe
don't look down at what you've sat in*



La nova tradukdefio

Denove temas pri teksto en Esperanto; ĉu vi povas redoni ĝin en taŭga anglalingva vesto? Memoru, **vi ne devos traduki la tuton** se vi ne volas aŭ ne povas; ni ĝoje akceptos ankaŭ fragmentojn. Do ne hezitu provi!

La teksto venas el la mallonga romano *Neologisme* (Helsinki: Fondumo Esperanto, 1975) de Lorjak, alinome Jacques-Louis МАНÉ. Ĝi bone montras lian amuzan, spritan – kaj foje adoleske malpudoran – humoron:

La prezidanto insistis:

– Komprenu, S-ro Polimiop. Tia situacio estas netolerebla. Ekde la komenco, tiu fraŭlino elmontris esceptecan talenton de profesia fuŝeco; ŝi superece ignoras la hortabelon de siaj deĵoroj, venas laŭplaĉe aŭ eliras senkonsidere de la horloĝo, senfine ŝercas kun siaj kolegoj, mokas la klientojn, klaĉas, babilas, vagas senmotive tra la koridoroj, okupas la tempon per multegaj agadoj, krom laboraj. Mi preskaŭ devus diri: feliĉe; ĉar kiam ŝi tuŝas ion, ŝi ŝajnas kore taski akumulon da katastrofoj, miksi la dosierojn, difekti la tajpomaŝinojn, perdi dokumentojn, makuli gravajn paperojn, ktp ...

Mi aldonu, ke la sinteno de tiu fraŭlino tute ne decas en serioza oficejo: ŝi fumas pli ol malnova lokomotivo, al si farbas la vizaĝon kvazaŭ publikulino, sidas sur la tabloj, kie ŝi senhonte paradas per siaj femuroj el sensacia minijupo, rakontas anekdotojn, kiuj purpurigus la vizaĝon de buĉosoldato ... Tia skandalo devas ĉesi. Kaj tuj! Ni jam decidis tion. Kial ĝi ankoraŭ persistas?

S-ro Polimiop streĉis siajn fortojn:

– Nu, S-ro Prezidanto, bedaŭrinde la afero ne estas tre simpla ... Mi nenion scias el rekta fonto. Sed promenas onidiraĵoj, kiuj malfaciligas tro rapidan decidon. Oni diras, ke ŝi konstante konservas kun si portreton de alta estro de nia propra firmao. Mi ne povis scii, kiun. Ĉiam laŭ babiltruoj, tiun portreton ŝi havus tatuata.

– Burleska ideo! Tatuata! Tatuata kie?

La direktoro pli ol iam aspektis plena je konfuzego:

– Pardonu, S-ro Prezidanto. Sed mi devas diri ĉion. Mi estas tre ĝenata. Tatuata ... jes ... oni diras ... sur ŝia postaĵo.

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 25-a de Marto**. Bonvolu sendi **nur unu** tradukon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

Strange, sed vere

La rubriko *Strange, sed vere* prezentas mallongajn legaĵojn en facila Esperanto. Per vortoj de la Baza Radikaro Oficiala ni rakontas al vi strangajn novaĵojn el ĉirkaŭ la mondo. Se vorto ne estas trovebla en BRO, ni difinas ĝin. Vi povas trovi **senpagan BRO-vortaron rete** <<https://bit.ly/37UCCyb>>, aŭ mendi **paperan libron de UEA** <<https://bit.ly/34Vcv3r>>.

Dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu

La vilaĝeto *Villas Las Estrellas* havas preskaŭ 100 homojn. Ĝi situas ĉe la antarkta insulo *King George*, kaj havas lernejon, bankon, kaj eĉ butikon por memoraĵoj. Se vi volas translokiĝi tien, antaŭ ol vi alvenos, vi devos esti operaciita por detranĉi kaj forigi vian apendicon. La kialo estas historia: la vilaĝo havas etan hospitalon, sed ne ĉiam kirurgon. La plej proksima hospitalo situas mil kilometrojn for kaj ĝi estas malfacile atingebla.



En 1961, rusa esploristo kaj kirurgo Leonid ROGOZOV estis ĉe la antarkta stacio *Novolazarevskaya*, kie li suferis apendiciton. Ĉar li estis la sola kuracisto tie, li devis operacii sin mem ... kaj dume li devis resti plene konscia.

Antarkt/o

La plej suda kontinento.

apendic/o

Malgranda parto de la dika intesto, kiu foje ŝvelas kaj povas kaŭzi morton se kuracisto ne detranĉas ĝin; ~ito: ŝvela malsano de la apendico.

Haroj ne donas, kion stomako bezonas

Kuracistoj operaciis 17-jaran knabinon en Bokaro, Barato, por forpreni sep-kilograman amason da haroj el ŝia stomako post jaroj da harmaĉado. Teamo de kuracistoj unue pensis, ke la bulo estas tumor, sed post seshora operacio ili malkovris, ke ĝi konsistas el haroj. [de *Metro News UK*, 2020-09-07]



tumor/o

Malsaneca ĉelaro, kiu kreskas en vivulo.

Por sobriĝi ŝteliston, antaŭe lin kaptu

Collin SULLIVAN kreskigas kanabon ĉe sia domo en Nov-Brunsviko, Kanado, kaj en Septembro li trovis ŝteliston en sia ĝardeno. Ĉiutage li observis etan muson kiu kaŝe eniris, manĝis kelkajn branĉetojn de la plantoj, kaj post nelonge perdis konscion meze de la folioj.




Foto de la senkonscia ŝtelisto, kiun Sullivan afiŝis en Facebook.

“Mankas al ĝi orelo, do eble ĝi bezonas medikamenton por konsoli sin”, afiŝis Sullivan en Facebook, “tamen mi opinias, ke jam estas tempo interveni.” Li transloĝigis la muson al kaĝo, kie ĝi nun ricevas nur unu mezgrandan folion tage. “Nia eta drogumulo travivis kelkajn malfacilajn tagojn”, raportas Sullivan, “kaj malgraŭ iom da stomakdoloro kaj ege forta sopiro manĝi ĉipsojn, mi opinias, ke li plene resaniĝos.” [de *Daily Mail*, 2020-09-10]

ĉips/oj

Maldikaj pecoj de terpomoj, frititaj kaj ofte salitaj.

drog/o

Dependiga substanco, ekz. alkoholo, tabako.

kanab/o

Alta herbo (latine, *Cannabis*) kiun oni ofte kreskigas kiel kuracilon aŭ drogon.

Koniĝas majstro laŭ sia verko


La branĉo de Vikipedio en la skota lingvo estas la plej granda kaj libera fonto de skotlingvaj tekstoj en Interreto. Lastatempe evidentiĝis, ke preskaŭ duono de la artikoloj en la skotlingva Vikipedio estis verkita aŭ redaktita de 19-jara viro en Norda Karolino ... kiu ne scipovas la skotan lingvon. Kiam oni rimarkis tion, la viro pardonpetis. Cetere, li diris ke li komencis sian laboron en la skotlingva Vikipedio kiam li havis nur 12 jarojn. [de *The Guardian*, 2020-08-26]



Leterkesto

“Lando” kie Esperanto estas oficiala

Alvenis la jena atentigo de Ellen EDDY, kiu instruas Esperanton per poŝta kurso:



La oficiala emblemo de Molossia.

Mi ricevis interesan informon de unu el miaj novaj perpoŝtaj studentoj. Li menciis la sendependan landon Molossia en Nevado, kie la dua oficiala lingvo estas Esperanto. Kaj **ĝia retpaĝo**

<http://www.molossia.org/esperanto.html> enhavas la dek lecionojn.

Kial mi neniam aŭdis pri tiu lando dum miaj multaj jaroj en Esperantujo? Mi scias ke la tuta afero estas iom ridinda, SED eble iom interesa dum ĉi tiuj nekutimaj tagoj.

Por la ermitoj, kiuj ankoraŭ ne scias: Molossia estas diktatura “respubliko” en la nevada dezerto, kiu militas kontraŭ Orienta Germanujo kaj uzas kuketo-paston kiel valuton. Por ekscii pli, krom la oficiala retejo ekzistas ankaŭ **artikolo pri ĝi** https://en.wikipedia.org/wiki/Republic_of_Molossia en la anglalingva Vikipedio. —Red.

— Ellen EDDY

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: bulteno@esperanto-usa.org, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.en>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.